



# aktuala

## 34-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001@gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Gladly, cgladly@arcadis.be; Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; [ebg.skynetblogs.be](http://ebg.skynetblogs.be); [xurb.freehostia.com](http://xurb.freehostia.com); [esperanto.net](http://esperanto.net); [esperanto.be](http://esperanto.be); [lernu.net](http://lernu.net); [uea.org](http://uea.org); [liberfolio.org](http://liberfolio.org); [eo.eventeo.net](http://eo.eventeo.net); [sites.google.com/site/ebgaktuala](http://sites.google.com/site/ebgaktuala); [sites.google.com/site/panb2001](http://sites.google.com/site/panb2001)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri nepo de Zamenhof (tria parto)
- Paĝo 3 - Aŭgusto Casquero daŭre en Ĉinio
- Paĝo 4 - Muriel Petit pri Biciklante tutnude en Bruselo
- Paĝo 4 - Pasportan Servon Minacas Disfalo
- Paĝo 5 - Liba Gabalda pri Universala Kongreso 94a en Bjalistoko
- Paĝo 6 - Jadwiga Greger pri Gdansko, urbo de Solidareco
- Paĝo 7 - Kostjantin Demjanenko pri Printempe en Belgio
- Paĝo 8 - Marjano Zdankowski pri Freŝo 2009 okazis en Olŝtino
- Paĝo 9 - Kerstin Rohdin pri Eta vizito en Stockholm
- Paĝo 10 - Eric Baert pri Triestra Fervojista Kongreso
- Paĝo 11 - Ula Wiczorek, Eduardo Kozyra pri Malborka Postkongreso
- Paĝo 12 - Decidoj de UEA; TEJO ne trovas volontulon
- Paĝo 13 - Poemaro de Garcia Orive kaj Moĵaev
- Paĝo 14 - Rusujo memoras Afganujon
- Paĝo 15 - Patro fianĉo de filinoj

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Julio kaj Aŭgusto : grupo feris Septembro 2009

- 2 Unua kunveno postferia prokrastita al la 16a de Septembro
- 9 Unua kunveno postferia prokrastita al la 16a de Septembro
- 16 Semajna kunveno unua post grupa ferio dum Julio kaj Aŭgusto
- 23 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 30 Dua prelego de Seán Oriain pri "Toastmasters" prokrastita al 21a de Oktobro

## ZAMENHOF-STRATO, LIBRO PRI NEPO DE ZAMENHOF (tria parto)

Jam unu fojon savita lastmomente de transporto al ekstermejo, filo Ludwik decidas kun patrino Wanda forlasi la getton. Tio postulis volon kaj monon. Ili enmiksiĝas en grupo de judoj kies laboro estas ekstere de la getto. Tio signifas subaĉeti la judan policiston, poste la polan. «Tiel, ni eskapis je la 8-a de aŭgusto 1942. Ni iris rekte al nia konatulo **Jankowski**, la financinspektoro ĉe kiu mia patro deklaris siajn impostojn.. Li jam ofertis sian helpon al mi post la arestado de miaj gepatroj. Ankaŭ en la getto, mi ricevis de li proponojn por helpi nin. Lidia rifuzis lian helpon ĉar tiu, kiu helpas judon, estas mortpunata.» Jankowski estis ano de la rezista movado, kiu establigis veran industrion pri falsado de dokumentoj. Li havigis 2 falsajn identigilojn : «ni renaskiĝis kiel Wanda kaj Krzystof Zaleski.»

Falsa identigilo ebligas ekloĝi ĉe propra adreso. Ili luis loĝejon kaj la filino de la dommastrino ebligis al Ludoviko-Kristoforo dungigi en agrikulturan bienon. «Estis tempo de maturiĝo de tomatoj kaj mi devis gardi la fruktojn kontraŭ ŝtelistoj. Mi ricevis simblan salajron kaj, ĉiutage, unu sakon da tomatoj kiun mi vendis al legomvendisto. » Tiu situacio abrupte finiĝis pro rabo en ilia apartamento. Ili tuj transloĝiĝis en alian kvartalon kaj la knabo trovis alian laboron, en konstrufirmao. Sed tie, la laboro estis al li tro peza post du jaroj da getta dieto, kaj bonŝance li trovis laboron en fabriko de elektraj instalaĵoj. Hazarde li renkontis sur strato gimnazian kolegon, kiu kaptis lin kriante **Jude**. Policisto deĵoranta proksime tuj ordonis al mi malfermi la pantalonon. Savis lin la decido de la gepatroj ne circumcidi lin kiel bebbon. Dank'al amiko de la familio, Ludoviko-Kristoforo poste trovis laboron en fabriko de ŝtalkingstruaĵoj en Minsk Mazowiecki, 40 kilometrojn oriente de Varsovio, kie li fariĝis skribisto en sekcio en kiu plejmulto de la laboristoj partoprenis la rezistmovadon, ĉefe per nevidebla sabotado de la riparataj militekipaĵoj. Kiel kontoristo, li falsis dokumentojn de la riparado. Iam, li estis enkarcerigita pro malapero de vraka tajpilo, kaj liberigita kontraŭ 50 litroj da vodko, dank'al la solidareco de la partizanoj de lia grupo.

Dum somero 44, la rusa armeo rapide avancas : Minsk estas konkerita, sed en Varsovio mem kaj okcidente, kie plu loĝas la patrino kaj kie sin trovas hazarde tiu momente la filo, la germanoj plu restas dum pluraj monatoj, ĉar la frontlinio stabiĝis ĉe la rivero Vistulo. Finfine Varsovio estas tute liberigita. Wanda retrovas tuj sian postenon de oftalmologo. Bedaŭrinde, ŝi mortos en trafikakcidento en 1954, nur 61 jaraĝa .

Tiel rapide kiel eblis, Zaleski-Zamenhof komencis studon en la Politeknika Altlernejo, kaj diplomiĝis kiel konstruĝenero en majo 1949, estante 23 jaraĝa. Tuj li ricevis proponon por specialiĝi en prembetonaj markonstruaĵoj . Ili fariĝis parto de lia vivo kaj ne lasis lin ĝis la fino de la profesia agado. Post kiam li elmigris al Francio, en 1959, li partoprenis en multaj markonstruaĵoj, kiel platformoj por ebligi petrol-boradon tra la tuta mondo. La unua kiun li projektis estis **Ekofisk**, sur la Norda Maro. La projektoj estis prilaboritaj en la kompanio DORIS. Li eĉ havis bonŝancon labori kun inĝenero Freyssinet, pioniro pri surmara uzado de prembetono. (daŭrigota)



94a Universala Kongreso en Bjalistoko, 25-31 Julio 2000

### AŬGUSTO CASQUERO DAŬRE EN ĈINIO

La 19a de junio finiĝis la kurso de Esperanto en la Altlernejo por Porprofesiaj Studoj de la ĉina urbo Foŝan. La rezulto estas kontentiga. Kvindekda da junaj gelernantoj entuziasme partoprenis la kurson. Dank' al la sukceso de la kurso kaj al la granda intereso de la lernantaro pri lerni la internacian lingvon, ekde septembro duobliĝos la nombro da gelernantoj kiuj partoprenos ĝin. Oni disdividos ilin en diversaj grupoj, kelkaj matene kaj kelkaj posttagmeze. Aliaj altlernejoj de la sama urbo deziras okazigi ankaŭ tiun kurson de Esperanto. Komence de septembro oni konos la decidon pri tio de la lernejestroj. Kvankam la lernado de Esperanto estas iomete pli malfacila por ĉinoj ol por eŭropanoj, pro la malsimileco de la lingvoj, tamen la rezulto estas bona. La instruisto estas la hispana esperantisto Aŭgusto Casquero, helpata de la loka samideano Liu Weizhuang. La direktoro de la lernejo, s-ro Jim Peng, multege kunlaboras, kontaktis aliajn lernejojn, por proponi okazigi tie la kurson de Esperanto kaj okazigis prelegojn pri E-o en du altlernejoj, por pli ol 500 gelernantoj. La junaj aŭskultantoj entuziasme petis la okazigon de la kurso.



Aŭgusto Casquero de la Cruz, ruĝa ĉemizo, en Foŝan, kun gelernantoj

Sur la foto oni povas vidi la gelernantojn de Esperanto kaj de hispana lingvo, kune kun aliaj samlerneĵanoj, kiuj deziras lerni nian lingvon. Ĉe la unua vico, kun ruĝa ĉemizo sidas la profesoro Aŭgusto Casquero, kaj maldekstre de li sidas la direktoro de la lernejo, esperantisto S-ro Jim Peng.

Aŭgusto Casquero



### BICIKLANTE TUTNUDE EN BRUSELO

Muriel Petit, membro de EBG, informis pri bicikla promenado tutnude en Bruselo, la 27a de Junio, fare de ekologista movado.

Tri postulataj celoj de la agado:

- Liberigi la stratoj de la veturila trafiko, redonante vivon al la publikaj vojoj.
- Liberigi korpoj kaj spiritoj de la reklama propagando.
- Savi la planedon de la homa memmortiganta trokonsumeco.

Kvar proponoj de la agado:

- Rezervi la urboj al la translokiĝoj nepoluaj, bicikloj kaj piedirantoj.
- Publikaj transportoj komunaj, nepoluaj, ekologiaj, efikaj, senpagaj por ĉiuj.
- Malpermesigo de reklamado celante infanojn rilate al aŭtomobiloj kaj flugvojaĝoj.
- Permesigo kaj nediskriminado de la simpla naturema nudeco.

### PASPORTAN SERVON MINACAS DISFALO

La plej grava servo de TEJO estas en kaosa stato post la ŝanĝo de respondeculo. Jam proksimas la fino de la libertempa sezono en Eŭropo, sed daŭre ne aperis la papera listo de gastigantoj de Pasporta Servo. La nova retejo de Pasporta Servo senanonce ŝanĝis sian adreson:

[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org). Tie troveblas nur 416 nomoj de gastigantoj. La listo de la jaro 2008 enhavis la adresojn de 1.225 gastigantoj en entute 90 landoj, do restas nur triono. "Laŭ la nuna stato mi kredas ke Pasporta Servo disfalos, aŭ ke la adresinformoj almenaŭ rapide malaktualiĝos" timas Derk Ederveen, kiu dum dek tri jaroj prizorgis la liston de gastigantoj.

## 94-A UK 2009 EN BĴALISTOKO

Pli ol 1800 kongresanoj el 63 landoj ĝuis vere eksterordinaran kaj elstaran kongreson en la naskiĝurbo de L.L.Zamenhof en Bjalistoko. Ĝi estis elektita por omaĝi la 150-an naskiĝjubileo de la kreinto de Esperanto. Bjalistokanoj fieras pro tiu grava personeco. La tuta urbo eksciis pri nia evento. Stratoj estis ornamitaj per E-flagoj kaj pluraj afiŝoj ne povis esti ne rimarkitaj. Ankaŭ la urbanoj povis ĝui kelkajn E-aranĝojn okazantaj en la urbo kaj koncerton de Jomo kaj Kimo en la parko. La etoso kaj entuziasmo en la kongresejo estis grandega malgraŭ kelkaj incidentoj fare de iuj vandaloj. La konstruaĵoj de la Politekniko de Bjalistoko funkciis kiel kongresejo. Apude estis konstruita grandega tendo ekipita per ekranoj. Tie okazis la plej gravaj solenaĵoj kaj eventoj.

La inaŭguran ceremonion ĉeestis diversaj politikaj kaj urbaj aŭtoritatoj kaj la partoprenantojn bonvenigis ankaŭ la nepo de nia Majstro. Dum la paŭzo intervenis trupo da talentaj gejunuloj kantante gajajn, melodijajn kantojn. Reprezentantoj de ĉiuj nacioj bondeziris al la kongresanoj en ilia koncerna lingvo “Pacon al vi”.

La Movada Foiro ĉiam pligrandiĝas kaj la asocioj sukcese prezentas al la publiko siajn agadojn kaj planojn por la estonteco. La programo estis riĉega, ĉiu povus elekti laŭ sia intereso kaj povis ĉeesti nur parton de la abunda oferto. Grandan intereson de la partoprenantoj vekis la kleriga lundo dum kiu estis pritraktitaj interesaj temoj. Fakaj asocioj havis siajn kunvenojn, estis diskutata la ĉeftemo de la kongreso: “Krei paĉan ponton inter la popoloj”, la estraro kaj la Centra Oficejo respondadis demandojn de la publiko, estis prezentitaj filmoj, pola lingvo eksprese, prelegoj pri Pollando, okazis lingvaj kursoj kaj la Internaciaj Ekzamenoj. Vespere ni povis observi per teleskopo stelojn. Ne mankis la ŝatata aŭkcio jam tradicie kaj sprite gvidata de Humphrey Tonkin kaj aliaj

5  
interesaj prelegoj. Ankaŭ la gejunuloj invitis nin al sia programo. La tuttagaj ekskursoj celis konatiĝon de diversaj regionoj de Pollando.

La Kongresa kuriero aperadis ĝustatempe kun diversaj novaĵoj rilate la kongreson kaj ekde la dua numero aperadis regule intervjuoj de konataj esperantistoj pri prognozo de evoluo de Esperanto ĝis post 50 jaroj. Perfekte funkciis poŝto kun speciala porokaza stampo kaj la poŝtaĵoj estis liveritaj per speciala trajno aŭ balono kun aldona stampo.

Paralele okazis muzika festivalo de kulturoj en la urba placo. Dum la semajno spekteblis multaj artaj programoj. Iuj estis dediĉitaj al la juda kulturo. Tre impresa kaj bunta estis la Nacia Vespere. Al la publiko estis amplekse prezentataj muzikaj kaj dancaj tradicioj de Pollando el diversaj tempoperiodoj. Ankaŭ la bankedo, al kiu ni ĉi-jare aliĝis por festi nian 30-jaran geedziĝon la 27-an de julio, estis bonega kaj festena.

Ĉi-foje la plej malmulte kostaj loĝejoj en studentaj ĉambroj situis plej proksime (vid-al-vide) de la kongresejo, kio kontentigis la plejmulton de la partoprenantaro.

En la urbocentro okazis pluraj E-aranĝoj en la kafejo Fama, teatraĵoj en urbaj teatroj kaj multaj el ni vizitis la kafejon Esperanto. Urbocentre troviĝas turismaj informtabuloj pri lokoj ligitaj al la historio de Esperanto, ĉefe al la Majstro kaj la Esperanto-Centro ofertas ekspozicion pri la vivo de Zamenhof.

Resume, pri la ĉi-jara UK ne eblas paroli alimaniere ol per superlativoj. Dank’ al la lokaj aŭtoritatoj, LKK-anoj kaj multaj helpantoj ni povis ĝui modelan kongreson. Dum la tuta semajno regis entuziasmo, festa etoso kaj amikaj renkontoj. Malfacilis forlasi tiun belan lokon.

Espereble la tri kubanoj partoprenintaj la ĉi-jaran kongreson inspiriĝis kaj provos aranĝi venontjare same grandiozan kongreson en Havano. Ili promesis tion...

Liba Gabalda, Francujo

## 6 GDANSKO, URBO DE SOLIDARECO Postkongreso 1-5 Aŭgusto 09

Tre sukcesa estis nia Postkongresa Renkontiĝo en Gdansko. La Dio kaj Zamenhof gardis nin, kaj venis krom poloj nur 20 eksterlandanoj (ni revis kaj havis progamon por 100). Dank’al tio ĉio facile sukcesis. Plej grava por ni estis TAGO de ESPERANTO oficiale enskribita en la someran programon de la urbo kaj en la programon de Dominikana Foiro. Dank’al la kunorganizinto – “Plama” Gdański Archipelag Kultury – kaj profesia organiza kunlaboro, la tuta programo estis vere sukcesa.

Al Bonveniga Lunĉo venis Honora Gasto – Prezidanto de plej alta ĉambro de Pola Parlamento, Bogdan Borusewicz, heroo de la lasta vojo al libereco en Pollando, la ĉefa organizinto de ŝipafareja striko en aŭgusto 1980 j.

Estis enmanigitaj du medaloj kun jena letero: “*Kiel la aprobon kaj estimon okaze de centjariĝo de la Esperantomovado en Pomerio mi havas honoron oferi al la Estimata <S-ino Zofia Kamieniecka> / <S-ro Henryk Kosicki> de Gdanska Filio de Pola Esperanto-Asocio, la Medalon de la Prezidento de la Urbo Gdansko, Paweł Adamowicz*”

La Esperanto-himnon ludis sur karilono de la Urbodomo profesia muzikistino, Monika Kaźmierska, do je la fiksita horo ni aŭskultis nian himnon, ĉe la flanka strateto.

Eĉ la leciono de Esperanto por hazarda publiko estis sukcesa. Verdire sukcesis esperantistino-instruistino Małgorzata Zięba-Szmaglińska (profesia instruistino de la germana lingvo en lernejo). Mikaelo Bronŝtejn aktive helpis, sen amatoreco en instruado de Esperanto!

La E-koncerto sur la ĉefa placo de malnova urbo havis grandan publikon. Unue kantis Mikaelo

Bronŝtejn - pole, ruse kaj Esperante – kaj la publiko kune kun li. Post la koncerto vico da poloj kaj ĉksterlandanoj volis aĉeti diskojn de Jomar kaj Nataŝa.

Okazis ankaŭ surstrata “*happening*”, kelkaj gejunuloj sur stilzoj kun grandaj E-flagoj rondiradis sur la placo por ĝojigi partoprenantojn de nia aranĝo kaj alvoki publikon al la Koncerto.

Dum sekvontaj tagoj la programo estis nur por esperantistoj partoprenantaj la renkontiĝon. Post unu tago ĉiuj jam konis bone unu la alian. La gaja etoso estas videbla sur fotoj en fotoalbumo je retpaĝo [www.esperantowsopocie.pl.tl](http://www.esperantowsopocie.pl.tl)

La unuan fojon internacia grupo de esperantistoj, metis florkronon ĉe la monumento de pereintaj en 1970 ŝipfarej-laboristoj sur la Placo de Solidareco.

Sukcesis pikniko kun ĉampano de la urbestro, okaze de la 50-jariĝo de replanto de Esperanto-kverko en Sopot. Geesperantistoj 8 estis ornamitaj per floraj girlandoj, tiuj kiuj en 1959 jaro partoprenis IJK-on en Gdansko kaj nun ĉeestis la piknikon.

Ĉio finiĝis en gaja etoso vespere la 4-an sur la galeono LEW (leono) naviganta sur la rivero Motlava.

Verdire la preparado al tiu aranĝo daŭris pli ol unu jaron, do organiza sukceso estis deviga.

Ni esperas, ke en Gdansko, kie somere estas milionoj da vizitantoj, parto de ili rimarkis, ke Esperanto vivas, kaj eble reveninte hejmen ili serĉos eblecon lerni la lingvon.

Nur la trajna freneza vojaĝo el Bjalistoko al Gdansko la 1.08.2009 restis en memoro kiel ekzota aventuro, simila al tiuj el la filmoj usonaj pri “Sovaĝa Okcidento”.

Simbolan Verdán Kokon en venontaj jaroj vi povos foti en Gdansko dum la Dominikana Foiro .

Jagoda, Jadwiga Greger, Sopot, Gdansk, Pollando

## PRINTEMPE EN BELGIO

Unuan fojon mi vizitis Belgion kaj Bruselon en la 2006 jaro, kiam partoprenis en faka internacia seminario de Eŭropa Komisiono. Ĝi estis organizita por funkciuloj kaj sciencistoj, kiuj laboras por internacia konvenco CITES (Konvenco pri savo de raraj specoj de floro kaj faŭno). Tiufoje mi havis 5 tagojn en Bruselo, nova por mi urbo. Kvar unuajn mi pasigis, oni povas diri, ene de konstruaĵoj de Eŭropa Komisiono. Kaj nur kvina tago evidentiĝis plimalpli libera por mi. Sed kien iri en nekonata urbo?

Feliĉe mi kunprenis mian libreton de "Pasporta Servo", trovis en ĝi kelkajn telefonnumerojn de geesperantistoj bruselaj kaj provis telefoni el mia hotelo...

Rezultiĝis tio, ke kaj dum mia lasta tago mi havis mirindan konatiĝon kun esperantistoj kaj plenplenan de impresoj vesperon. Dank'al ili mi vere eksentis la urbon kaj konatiĝis kun ĝi. Dekomence estis ekskurso en la centro, en kiu min gvidis Paulo Branco kaj Manca Turk. Poste mi gustumis (nun la plej ŝatatan por mi) belgian bieron ("Kwak"). Kaj poste okazis vesper-nokta ekskurso al ĉefa konstruaĵo de Eŭropa Komisiono, kiu okazis dank' al Sauro Orsini, kaj en kiu nin akompanis Ben Indestege. Neunufoje mi malkovris por mi, ke ĉiu urbo vere malfermiĝas, kiam mi ekkonas ĝin kun homoj, kiuj loĝas en tiu ĉi urbo. Sen homoj, kiuj estas kvazaŭ parto de la urbo, mi estas blinda, ofte iradas laŭronde kaj ne rimarkas belaĵojn kaj gravaĵojn, kiuj estas apude...

Poste estis la 2008-a jaro, kiam ni kun mia edzino Jana venis al Bruselo

7  
aŭtomobilvojaĝinte en Eŭropo. Dum tiu ĉi vizito nia amiko Paulo Branko pli profunde konatigis nin kun Bruselo, kaj ne nur. Ni ekvidis aliajn belegajn belgiajn urbojn - Antverpenon, Genton, Mehelenon, Leuvenon. Tiujare ni unuan fojon estis gastoj de Esperantista Brusela Grupo kaj partoprenis en speciale organizita ukrainia vespero.

Kaj jen venis la 2009a jaro, kaj ni denove estas en Belgio, denove estas en amika hejmo de Paulo kaj partoprenas en kunveno de Esperantista Brusela Grupo. Ĉi foje ni vizitis Brugge-n, Oostende-n kaj Namuron.



Kostjantin Demjanenko en Oostende, 1a de Aprilo 2009

Apenaŭ eĉ nun ni povas konstati, ke konas Belgion, sed nun ni povas diri, kial ĝi plaĉas al ni. Belgiaj urboj aspektis por ni kie belaj kaj trankvilaj. Laŭ impresoj Bruselo estas moderna kaj antikva samtempe, sed eĉ ĝi ne estas tro brua por ĉefurbo de la ŝtato kaj de Eŭropa Unio. Nur streĉa trafiko komence kaj fine de tago memorigas pri grava statuso de la urbo. Ankaŭ flughaveno de Bruselo, ŝajnas, estas jam tro malgranda por tia ĉi urbo.

Ankoraŭ ni rimarkis, ke Bruselo estas tre multnacia. Tio rimarkeblas ankaŭ en Esperantista Brusela Grupo, membroj de kiuj estas reprezentantoj de multaj nacioj.

Ni ĝojas, ke feliĉa okazo konatigis nin kun via urbo, lando kaj via amika rondo. Dankon pri tio, kaj bonvenon al Ukrainio!

Kostjantin Demjanenko, Berdjansko, orienta Ukrainio, Aprilo 2009

8

## FREŜO 2009 OKAZIS EN OLŜTINO

Precize ĝi okazis inter la 25-an de junio kaj la 01-an de julio, sed jam dum la unua tago nia loka televido deziris intervjui gefreŝanojn. Ĉi-tage (apude Freŝejo) okazis t.n. "Esperanta Pikniko" kiun vizitis dekoj de geurbanoj, interalie olŝtina vicurbestro. La sama "E-Pikniko" estis refarita dum antaŭlasta tago, ankaŭ kun sukceso... Mi suspektas, ke vi komprenas: "E-Pikniko" estas ĉefajra renkontiĝo kun kolbasetoj rostitaj en la fajro, kun malvarmigita biero, kun varma pola bigoso (kontrolu vorton!) kaj kun tre spicita tripo ...



Vendrede, post oficiala malfermo, kiun partoprenis ĉiuj okdek gefreŝanoj - estis "Olŝtina Tago" kun prelegoj pri la urbo kaj pri ĝiaj eminentaj loĝantoj kaj kun promenado tra la malnova urboparto.

En administraj limoj de Olŝtino situas deksep (!) lagoj, kaj ĝuste ĉe la plej grava lago "Ukiel" vespere okazis cigana festeno kun multe da muziko, dancoj kaj senpaga manĝaĵo por partoprenantoj. Dank'al amikaj rilatoj kun cigana olŝtina grupo - gefreŝanoj ricevis specialan inviton partopreni ĉi tiun ciganan feston.

Sabato estis grava tago pro du kialoj: matene okazis solena arboplantado (Lariko-Ludoviko) okaze de 150-a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof en apudolŝtina arbara ĝardeno kaj vespere koncerto de Jean-

Marc Leclercq (JoMo) sur la estrado centre de Olŝtino. Afiŝoj pri la prezentado de JoMo antaŭ olŝtina publiko estis dispendigitaj tra la tuta urbo jam du semajnoj pli frue. Dimanĉo estis destinita por plia promenada rekono de Olŝtino kaj por vespera koncerto en la Katedralo.

Dumlande gefreŝanoj marŝadis tra la Urba Arbaro kaj vespere, kiel kutime, bankedis (kaj dancadis) en restoracio "Kolorowa" kie ankaŭ estis anoncittaj rezultoj de du konkursoj. En la konkurso pri Olŝtino gajnis ŝ-ino Nina Pietuchowska el Bjalistoko (!) kaj en la malfacilaj Esperantaj Kvizoj, kiuj okazadis ĉiutage, la plej spertaj geesperantistoj estis:

1. POMORSKA Teresa - Pollando
  2. KOZYRA Edward - Pollando
  3. KUBICKA Mirosława - Pollando
  4. BRANÇO Paulo - Portugalio/Belgio
  5. KILIJANSKI Jerzy - Pollando
  6. ANICIENE Diemante - Litovio
  7. MAJEWSKI Mariusz - Pollando
  11. LYONS Steve - Britio
  14. WILKE Ulrich - Germanio
  20. PENCHUKOV Nikolay - Rusio
- Oni devas substreki, ke ĉijaraj kvizaj premioj estis riĉaj dank'al subvencioj de lokaj instancoj.

Mardo estis dekhora ekskurso al famaj, proksimaj, historiaj urboj ...

Oni devas mencii pri Freŝaj prezoj: Baza prezo de la tuta semajna restado dum Freŝo, manĝado kaj noktumado, estis 240 zlotoj aŭ 60 eŭroj. Rabatita prezo por 50 geesperantistoj kiuj plej unuaj pagis monon estis 120 zlotoj aŭ 30 eŭroj. Ni, olŝtinanoj esperas, ke venontjaraj prezoj por Freŝo estos similaj kiel ĉi-jaraj. Kaj kompreneble, kiel kutime, eventualaj rabatitaj prezoj estos por geesperantistoj kiuj plej frue pagos.

Marjano Zdankowski

## ETA VIZITO EN STOCKHOLM

Matenas. Ankoraŭ malheletas. Sidas ĉe la kuireja tablo kun mia taso da kafo. Sur la ĉielo strioj da malhelaj nuboj. Sub ili aperas iom post iom la aŭroro. La frostoj tremas en la aero, antaŭ ol la malforta varmo de la suno superfortas la frostojn.



Kerstin Rohdin en Bjalistoka UK, kaj kun la redaktoro en Pärnu, Estonio, dum 45aj Baltaj Esperantaj Tagoj, 8-12 Julio 2009

Vestita en longa subpantalono kaj trikita jakso sub la vintra mantelo mi enbusiĝis kaj post duona horo mi alvenis en la centron de Stockholm. La mondo ĉirkaŭ la buso estas vestita en maldika tavolo da neĝo. La arboj vestiĝas per prujno. La oblikva sunbrilo origas la frostojn, kreas brilantojn sur la neĝo. Lagoj, golfoj videblas, kie glitkuristoj jam frumatene sketas. La urbo estas kaptita en forta teno de la klara vintra tago. "Venezio de la Nordo" estas tenata de la glacio. Glacirompa ŝipo tranĉis vojon por surakva trafiko. Kiel facile La Naturo superas la civilizacion de la socio! Malgraŭ la frostoj la homoj kuras inter la diversaj butikoj kaj vojaĝoficejoj, kiuj ĉiuj reklamas malmultekostajn varojn kaj vojaĝojn, por ke homoj uzu sian monon ankaŭ dum malaltkonjunkturo. Mi trovis la varojn, kiujn mi intensis aĉeti en la urbo – paperon por leteroj

9 kaj skribilojn. Mi trovis miajn "gojiberojn" en la Centra Bazaroj. Oni diras ke tiu nomo signifas "feliĉoberojn".

Mi aŭskultis koncerton – adiaŭon al Kristnasko en Klara preĝejo, unu el la plej malnovaj de Stockholm. La koncerto komenciĝis per solena ludado de kariljono.

Sub malforta sunbrilo mi pasumis "Unter den Linden" en la Reĝa Ĝardeno. Muziko sonis. Infanoj sketis. La ruĝa preĝejo de Jakob dominas la foran parton de la Reĝa Ĝardeno kaj la Placo de Karl XII. La kafejo Söderberg, kiu estas somera kafejo kaj ne izolita por vintra vetero, tamen estis malfermita. La glacio okupas la kadrojn de la etaj fenestroj. Mi vidas la mondon kiel etajn artaĵojn enkadrigitajn per glacio. Kelkaj centimetroj da neĝo surgrunde. Homoj en dikaj vintraj vestoj vagas tien kaj reen kun pakaĵoj kaj plastaj sakoj. Mi sentis min parto de klasika rusa romano kiel rigardanto el la kafejo al la enloĝantoj, kiuj rapidis sur la stratoj de Sankt Petersburg. Homoj kurantaj vestitaj en longaj vintraj manteloj dum la frostoj premas la urbon.

Malforta lunarko alte surĉiele. Krepusko ĉirkaŭbrakas arbojn kaj domojn. Mi interparolas kun Doktoro Glas, kiu ĵuste tie ĉi, antaŭ cent jaroj ofertis al sia rivalo glason da akvo fortigita per trodozo da medikamento por liberigi lian edzinon – ĉu eble por si mem? Post iom da parolo kun la fama Doktoro Glas en la romano de Hjalmar Söderberg mi eliris, por laŭ la kajo de Strömmen kun la sunsubiro rebrilanta en la akvo trovi la vojon al mia buso hejmen.

Kerstin Rohdin, Stockholm, Svedio, 7-an de Januaro 2009

10

## TRIESTA FERVOJISTA KONGRESO

Italio, urbo Trieste, 61-a IFEF-kongreso, 23-29 majo 2009. Laŭ la listo estis 207 partoprenantoj. Ni unue kunvenis en la grandaj salonoj de la Stazione Marittima, kaj poste en la sidejo de Triesta E-Asocio. La urbo estas tre interesa, ni vizitis la judan kvartalon, la fiŝkaptistan kvartalon, la malnovan kastelon, diversajn monumentojn kaj preĝejojn, la tramon kiu iras super la monto; kelkaj homoj vizitis la kastelojn Duino kaj Miramar. En la urbo loĝas 200.000 loĝantoj, kaj estas multe da bruoj. Dum la tago kaj la nokto la motorciklantoj bruas. Apud la urbo estas granda haveno per kiu transitas la oleon por Aŭstrio, kaj estas ferfabriko kiu poluas la atmosferon. La urbo estas konstruita sur tereno kiu estas situata kelkaj metroj super la marnivelo, kaj poste estas krutaĵo "karst". Mi loĝis en la hotelo Albarda kie loĝis Niemann, Himst kaj Cekaj, partoprenantoj slovakaj. La familio Niemann kaj Olsen venis el Danio trajne (24h), Georges Meilhac el Parizo (14h), alia el Genevo (9h).

**Eroj en la Programo troviĝis:**

-Triesto sin prezentas.

-Fervojoj novaj.

-Fervoja Muzeo

-Granda rapida trajno.

-Violonfarada arto (*ege interesa*).

-Bankedon kaj Balon (*mi ne deziris partopreni*).

-62-a kongreso sin prezentas (*limdato ĝis 30-a de januaro*).

-Art-pentritaj stacidomoj per "Tag".

-Por protekti la trajnojn kontraŭ la "Tag" oni protektas ilin per plastaj folioj.

-Plenkunsido publika (*ni akceptis la financon raporton kaj proponojn de la estraro; prezidanto Romano*

*Bolognesi demandis ke entonte alia homo anstataŭu lin.*

-Lokomotivoj en Italio (*ne ekzistis loka karbo do oni rapide konstruis elektrajn lokomotivojn kiu funkciis unue per trifasa elektro, kaj poste per kontinua elektro*).

-Terminologiaj diskutoj de Heinz Hoffmann (*Hoffmann loĝis en alia urbo "Muggia" kaj venis al la kongresejo per boato kaj per aŭtobuso*).

-Ekskurso al Cividate kaj al Udine (*en Cividate ni vidis sur malnova enirpordo de la urbo tre malnovan tekston skulptitan sur ŝtono en la hebrean lingvon: "ni ne estas kulpuloj de la morto de Kristo ĉar ni jam estis antaŭe en tiu loko"; en Cividate ni manĝis kaj interparolis en la sama tablo kun la Ĉinoj, la Danoj kaj Francoj; en Udine loka esperantisto montradis memorŝtonon pri Zamenhof sur la muro de la kastelo*).

**Kiam finis la kongreson,** la partoprenantoj povis doni liajn impresojn dum la Movadaĵo Aferoj. Martin Stuppniĝ akuzis ke la homoj de la diversaj landoj restas inter si kaj ke ili krokodiladas. Kion pensas la Triestanoj kiam ili audas tion...? Oni diras ke Esperanto estas facila, kaj oni krokodilas! La partoprenantoj devus sekvi kurson de E-o por bone paroli dum la estonta kongreso en Sofia. Jan Niemann, dano, diris ke antaŭ kelkaj jaroj li kongrese loĝis kun aliaj Danoj en Hungario kaj tiam la Hungaroj transloĝigis lin ĉe la Hungarojn por ke li ne povus krokodili! Mi partoprenis la unuan tagon de la postkongreso. Anstataŭ viziti per trajno ĉirkaŭ Trieste, ni iris al Slovenio viziti grandan groton. Poste ni manĝis kaj vizitis fervoj-miniaturan klubon kaj kripjon. Eric Baert, membro de EBG, Aŭgusto 2009

## MALBORKA POSTKONGRESO

La alta protektanto de la oficiala postkongreso de UEA en Gdinio-Malborko (la 1-5an de aŭgusto 2009) estis Bogdan Borusewicz la prezidanto de pola Senato (la supera ĉambro de pola Parlamento). Dum la postkongreso oni inaŭguris la 2an de aŭgusto unu Zamenhofan E-Objekton, ZEO-n, en Gdinio, E-kverko sur ŝtona monto. La 3an de aŭgusto oni inaŭguris 5 ZEO-jn en Malborko: 1. E-memorŝtono okaze de 100jara jubileo de Esperanto en Malborko, apud Urbodomo en Malnova Urbo; 2. E-memorŝtono kaj karpeno omaĝe al Antoni Grabowski, en Parko de la Mondo, 3. E-memorŝtono kaj kverko omaĝe al Papo Johano Paulo la Dua, apud Urbodomo en Malnova Urbo, 4. E-memorŝtono kaj tuliparbo "Barato", en Parko de la Mondo, 5. E-memorŝtono kaj platano "Britio", en Parko de la Mondo kaj la 5an de aŭgusto en germana ekstermeja koncentrejo Stutthof ni inaŭguris konstantan E-ekspozicion "Esperanto en koncentrejo Stutthof".

Ni vizitis Teŭtonan Kastelon en Malborko (la plej granda brika kastelo en la mondo, Unesko objekto de monda kultur-heredaĵo), Gdinion (maristan ĉefurbon de Pollando kun unika modernisma arkitekturo), Sopoton (la plej fama kuraĉloko en Pollando), Gdanskon (la urbon de Solidareco), urbon Tczew (kun ponto konstruita de inĝeniero Ejfelo /Unesko objekto de monda teknik-heredaĵo, ĉe kiu fakte komencis la Dua Mondmilito, la 1an de septembro 1939).

La inaŭguro de la postkongreso okazis en Gdinio kun ĉeesto de la urbaj aŭtoritatoj, venis TVP Gdansko, gazetaroj, du folklor-ensambloj kaŝubaj: "Gdynia" kaj

11

"Kaszebsko Rodzezna". La inaŭguro okazis en la plej bela loko de Gdinio ĉe la Muzeo de Urbo Gdinio kaj interne de ĝi. Raporto pri ĝi aperis en televido (<http://ww6.tvp.pl/7014.20090802922732.strona>) kaj du artikoloj en la plej prestiĝa pola gazeto: "Gazeta Wyborcza". Ni vizitis la muzeon kaj la plej belajn partojn de la urbo: Skvaro de Kosciuszko, moleon, Ŝtonan Monton. Tie ni aŭskultis muzikon i.a. kantis koruso "Esperanto" kaj okazis publika eta kvizo pri Esperanto, la gajnintoj ricevis Esperanto librojn kaj vortarojn, kaj ĉe la fino jam urba publiko kantis kune en Esperanto. Ni partprenis ankaŭ ekumenan diservon kaj regalon post ĝi kun ebleco babili kaj interkonatiĝi.

Ĉe la malborkaj novaj ZEO-j kantis en Esperanto la kaŝuba folklor-ensamblo /infan-junulara/ "Kaszebsko Rodzezna" el Komunumo Linia sub la gvido de Maria Zalewska, belege sonis i.a.: "Knabino arbareto", "Kaŝubaj lagoj", "Barko", "Nigra Madono", "Abba - Patro!". La inaŭguron ĉeestis aŭtoritatoj de la Urbo kaj Distrikto de Malborko: Distriktestro de Malborko Mirosłavo Czaplą, Prezidanto de Urba Konsilantaro Arkadio Mroczkowski kaj eks-direktoro de Kastela Muzeo Arkadio Binnebesel (la filo de la unua polo-esperantisto

Bernardo Binnebesel kiu estis kunfondinto de la E-rondo en 1909jaro). Kompreneble ĉeestis ankaŭ prof. Probal Dasgupta, prezidanto de UEA; prof. John Wells, prezidanto de AdE-Akademio de Esperanto; prof. Zbigniew Antoni Kruszewski el Teksasa Universitato El Paso, vicprezidanto de Kongreso de Poloj en Usono, kaj nepo de Grabowski la patro de Esperanta poezio; S-ino Claude Nourmon, vicprezidantino de UEA; S-ro Brian

12

Moon, vicprezidanto de AdE; prof. LEE Jung-kee, prezidanto de Korea Esperanto-Asocio; S-ino Halina Komar, prezidantino de Pola E-Asocio; S-ro Robinson Mattos, direktoro de Spiritisma Eldona Asocio F.V. Lorenz; S-ro Mario Migliucci, itala aktoro kaj aŭtoro de monologo "Doktoro Esperanto"; pastro Roman Forycki, eks-rektoro de la Supera Porpastra Seminario; S-ro Brunetto Casini, eldonisto (Edistudio) kaj ... sume 60 elstaraj geesperantistoj el 27 landoj kaj 5 kontinentoj.

Krome nia klubano Helena Biskup prezentis sur scenejo de la Urba Kultur-domo en Malborko la monologon "Doktoro Esperanto" en pola versio. Tuj post okazis E-versio de la aŭtoro mem, Mario Migliucci. Post la inaŭguro de la ZEO "Vatikano" estis celebrita Sankta Meso en Esperanto en la preĝejo de S-ta Johano Baptisto. Tie infanoj de la kaŝuba folklor-ensamblo "Kaszebsko Rodzezna" denove bele kantis en Esperanto.

*Ula Wieczorek, Eduardo Kozyra, organizantoj*

## DECIDOJ DE UEA

UEA Komitato volas ĉies retadresojn. La Centra Oficejo de UEA strebu kolekti la retroŝtajn adresojn de ĉiuj esperantistoj en la mondo por poste uzi tiujn en sia informado. La branĉoj "filmo" kaj "kanto" de la Belartaj Konkursoj provizore estu nuligitaj. Decidojn kun tia enhavo aprobis la Komitato de UEA en sia kunsido vendrede matene, la 31a de julio, en Bjalistoko. Estis akceptita unu nova landa asocio kaj unu nova kunlaboranta faka asocio de UEA: Mongola Esperanto-Societo kaj Monda Asembleo Socia. Alia aliĝpeto venis el Angolo, sed en la nuna stato

la komitato pri aliĝpetoj ne povis proponi kaj rekomendi aprobon, ĉar ne ĉiuj dokumentoj en ĝi estas en Esperanto.

## TEJO NE TROVAS VOLONTULON

Ekde la komenco de julio Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) sensukcese serĉas novan volontulon por unujara deĵorado en la Centra Oficejo en Roterdamo. La limdato dufoje estis ŝovita, ĉar tute mankis kandidatoj. La lasta anonco estis farita la 22-an de aŭgusto, kaj la nova volontulo devus komenci sian deĵoradon jam en septembro. Paŭlo Ebermann, la nuna volontulo, finas deĵoron komence de septembro. Grava postulo por kandidatoj estas, ke ili krom Esperanto devas scii ankaŭ la anglan lingvon. Scipovo de aliaj lingvoj estos pozitive konsiderata. Aldone la kandidato devas ŝati administran laboron, havi profundajn konojn de la junulara Esperantomovado, de la eŭropaj junularaj strukturoj kaj eŭropaj instancoj. Krome la kandidato devas esti individua membro de TEJO, kaj havi la rajton laŭleĝe restadi en Nederlando dum la volontula periodo. TEJO ne havas la eblon akiri labor- aŭ restadpermeson por volontulo, kiu ne estas civitano de Eŭropa Unio kaj ne jam havas tian permeson. Neniu kandidato, kiu plenumus la formalajn kondiĉojn, aperis ĝis la limdatoj, spite plurajn anoncojn. Limdato estis plilongigita ĝis la 31-a de aŭgusto. Laŭ Gregor Hinker, la prezidanto de TEJO, post la lasta plilongigo finfine aperis kandidatoj, sed ankoraŭ tro fruas diri, ĉu iu el ili estos elektita por la posteno.

## MI ESTIS EN BĴALISTOKO

### Paĝoj de mia taglibro

Bĵalistoko, dudeksepa, julio:  
naŭdek kvara Kongreso de  
Esperanto.

La urbo brilas kiel diamanto  
en ĉi tiu tago por l' historio.

Bĵalistoko, estas la umbiliko  
hodiaŭe, de la Universala  
Esperanta Movado; l' festivala  
ĉefurbo de la verda stel-mistiko.

Ĝi estas kiel blua firmamento  
kie pendus helaj 'smeraldaj steloj,  
brilante en parfumbrulaj kandeloj  
kadre de buntsomera ornamanto.

Pro la milda blovaero, la flagoj,  
skuitaj de l' vento, ŝajnas magia  
verda maro; ondoj el nostalgia  
espero, kun verdaj steloj imagoj.

Tra Zamenhofaj urbaj arterioj  
fluas sango de la tutmondaj rasoj:  
malsamhomoj de kondiĉoj kaj  
klasoj;  
samaj, en esperantaj strategioj.

L' granda Esperantista familio  
moviĝas en Eŭropo kaj Afriko;  
en la Norda kaj Suda Ameriko;  
kaj en Oceanio kaj Azio.

El la kvin pintoj de la Verda-  
Stelo,  
ĉiuj alvenas al la Stela centro  
plenumiĝitaj de multkolorpentro,  
kiel se ili estus l' ĉielo.

Tuj komencos la malfermo solena  
pri la paco, kaj aniversario  
de la Zamenhofa evolucio  
pri l' Esperanta lingvo fenomeno.

Dume mi piediras tra la spuro  
de la kreinto de l' Internacia  
Lingvo meditante pri opinia  
diskuto, de la lingvo en l' futuro.

Mi estis en la Zamenhof-Muzeo,  
elvokante l' genian karakteron  
de kiu, en la homaro, l' esperon  
kreis, pere de klera Dia feo.

Al la Kongreso-Tendo, mi iras  
por partopreni en la konferenco  
pri Esperanto, signifo kaj senco,  
kaj pri la paco, ke per ĝi akiras....

"En laboro paca ne laciĝos,  
nia diligenta kolegaro,  
ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
por eterna ben'efektivigo."

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo, aŭgusto 2009

## KISANTE LA LUNON

Mi volis renkonti la lunon  
Sur la surfac' de l' rivero,  
Do venis vespere al ponto...

La nokt' estis hela, superba,  
Mi staris kaj trinkis la vinon,  
Pensante pri vi, mia kara...

Mi volis renkonti la lunon,  
Sed ĝi restis post mia dorso...  
Mi eĉ kalkuli sukcesis:

Se stari ankoraŭ du horojn,  
Do la luno ja nepre aperos  
Sur l' rivera rigida surfaco...

Mi poeton Li Po rememoris \* ,  
Ankaŭ mi, eble, saltus riveren,  
Se mi vin, krom la lunon, ne havus...

Ankaŭ vi eble spektas la lunon,  
Ankaŭ vi, eble kredas je io  
Nekredebla, mistera, enigma...

Luno pigris kaj tute ne hastis,  
Mi fallasis l' botelon malplanan  
Kaj en nokton sen spur' malaperis...

Paŭlo Paŝa Mevo Pavel Mojaev, Simferopolo, Krimeo, 27-29.01.2002

\* NA: Laŭ la legendo, la ĉina poeto Li Po pereis,  
penante kisi la speguliĝon de la luno sur la akvo.

## RUSUJO MEMORIS AFGANUJON

Rusio rememoris la 20-an datrevenon de  
la sovetia retiriĝo el Afganio, kaj  
veteranoj de tiu milito avertas, ke Usono  
povus ripeti la erarojn faritajn de Rusio  
dum la sanga konflikto. Eventoj en Rusio  
kaj aliaj eksaj sovetiaj ŝtatoj tiun  
dimanĉon okazis kviete, kun funebraj  
kronoj metitaj ĉe monumentojn kaj  
medaloj disdonitaj al veteranoj.



La 10jara milito,  
kiu komenciĝis  
en 1979, postlasis  
almenaŭ 13 000  
Sovetaj homoj  
mortintajn kaj  
eble mortigis  
proksimume unu  
milionon da

Afganoj. "Estas kiel batali kontraŭ sablo.  
Neniu forto en la mondo povas venki la  
Afganojn," Oleg Kubanov, eksa oficiro,  
diris ĉe datrevena koncerto en Moskvo.  
"Estas ilia sankta lando, negrave al ili se  
vi estas rusa aŭ usona. Ni ĉiuj estas  
soldatoj por ili." La milito kontribuis al la  
akiro de Afganio fare de la Talibanoj kaj  
la disfalo de Sovetunio. Je la 15-a de  
februaro 1989, la lasta sovetia soldato  
forlasis Afganion, tiel metante finon al  
milito kiun Moskvo komence eklanĉis  
por antaŭvideble nelonga tempo, cele al  
helpo de siaj afganaj subtenantoj. Dum la  
sovetia invado, rusaj militistoj trovis sin  
en negajnebla gerilo kontraŭ la  
"Muĝahidinoj", Islamaj batalantoj kiuj  
sin apogis sur Ŭsono kaj Saŭda Arabio.

La lasta sovetia soldato kiu eliris el  
Afganio estis la komandanto de la fortoj  
en Afganio, Generalo-Leŭtenanto Boris  
Gromov, kiu transiris la Ponton de  
Amikeco trans la Amu Darya rivero al  
tiam sovetia Uzbekio je tagmezo je la  
15-a de februaro. "Mi estas konvinkita de  
unu afero. Estas malprudente forgesi  
lecionojn kiel tiun de Afganio," Gromov,  
nuna guberniestro de la moskva regiono,  
diris al rusa ĉiutaga "Rosiskaja Gazeta".

Ŭsono, kiu lanĉis sian invadon de  
Afganio en 2001, prepariĝas sendi pli da  
soldatoj en la landon, provante pritrakti  
ekpliĝon de perfortaj agoj fare de

Talibanoj. Rusaj veteranoj avertis, ke  
Usonon trafos la inkubo kiu jam tiam  
trafis la sovetiajn fortojn. "Ili sendos pli  
en kaj ili perdos pli," Andrej Bandarenko,  
eksa oficiro de la specialaj fortoj, diris pri  
la usonaj planoj. "Kion Obama scias pri  
la situacio sur la tereno?" Samil  
Tjuktejev, kiu gvidis regimenton en  
Afganio inter 1986 kaj 1988, ankaŭ diris,  
ke la ekstraj soldatoj nur plimalbonigos la  
situacion. "Vi ne povas meti soldaton  
antaŭ ĉiun domon aŭ bazon sur ĉiun  
monton. Ni vidis tion mem, ju pli da  
soldatoj, des pli da rezisto," li diris.

Esplorstudo publikigita vendredon  
montris, ke 47 procentoj de Rusoj kredas,  
ke la invado de Afganio estis "politika  
aventuro en kiu la politika gvidantaro  
malprudente kondukis la landon". El tiuj  
sonditoj, 58 procentoj opinias, ke estis  
neniam kialo por sendi sovetiajn  
soldatojn en Afganion. Sed kelkaj  
respondeculoj ankaŭ provas argumenti,  
ke la perdoj ne estis vanaj kaj laŭdis la  
"herocon" de la Ruĝa Armeo en  
Afganio. "La soldatoj estis fidelaj al la  
juro de militista devo kaj frateco kaj  
montris kuraĝon kiel la rusa armeo ĉiam  
faris," laŭ Juri Luĝkov, moskva urbestro.



La datrevenaj  
memorfestoj  
koincidas kun  
movoj de ĉiam  
pli revigliĝanta  
Rusio por  
restarigi sian  
influan en la  
eksaj sovetiaj


landoj de Centra Azio post sia milito  
kontraŭ Kartvelio pasintjare. Ĝi donacis  
al Kirgizio 2 miliardojn da usonaj dolaroj  
kiel helpo tra la ekonomia krizo kaj ĝi  
forte subtenas Uzbekion en akvodisputo  
kun Taĝikio. La probableco, ke Kirgizio  
fermos usonan aerarmean bazon kiu utilis  
kiel nemalhavebla startpunkto por  
provizoj al Afganio, instigis NATO-n kaj  
Usonon serĉi alternativajn metodojn por  
alporti materialon al Afganio. Rusio  
konsentis permesi la transiron de  
nemortigaj provizoj, kaj deklaris, ke ĝi  
povus egale konsideri aertransiron.

## PATRO FIANĈO DE FILINOJ

Gaja okazintaĵo rondiris antaŭ nelonge en Munchen (NR: jaro 1910). Privatulo estas vidvo kaj havas du filinojn respektive dudek kaj dudek-du jaraj. Ili tamen ne povis anstataŭi al li edzinon, tial li ekpensis, "laŭ la ne plu malordinara vojo", nome per gazeta anonco ricevi novan edzinon. Li tamen tre miris, trovante inter multaj ricevantaj proponoj ankaŭ la leteroj kaj fotografaĵojn de siaj du filinoj. Ĉio tio ŝajnis sufiĉe amuzi lin, ĉar pseŭdonime li daŭrigis per skribmaŝino la korespondadon, ĝis la ambaŭ enamiĝintaj fraŭlinoj fine postulis vidi sian novan fianĉon. La

vidvo ankaŭ ebligis tion al ili, venigante ilin je sama horo en difinitan lokon kaj kondiĉante blankan **dianton** kiel rekon signon. Lia ĝojo pri la ŝerco jam komencis, kiam liaj ambaŭ filinoj antaŭe alportigis en sian domon blankajn **diantojn**, el kiuj li fine petis unu por si, por ke ĝi ekiri al la rendevuo. La mirego de la ambaŭ filinoj estis granda, kiam ili sentis, havi hazarde rendevuon en la sama loko kun la sama rekona signo; sed ĝi ankoraŭ pligrandiĝis, kiam fine ankaŭ la paĉjo aperis, kun la sama malbonsigna blanka **dianto**, kaj li subbrakinte kondukis ilin hejmen.

Tradukis Risinger (Eho Esperantista, 1910)



## CLAUDE GLADY



Elstara estrarano de EBG dum multaj jaroj, lasttempe emeritiĝita kaj translokiĝita al Cerfontaine.  
Foto de teatraĵo dum Zamenhof-a festo.